

JUNIO-JULIO 1962

Boletín

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA



Valladolid.—La Katedralo.

BOLETIN
DE LA
FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Redaktoro: S-ro Angel Pérez Saura

Kotizoj de la Federacio por ricevi BOLETIN

Membro abonanto: 60 pesetojn, jare.

Membro subtenanto: 120 pesetojn jare.

Ĉi tiuj membroj ricevas du ekzemplerojn
se ili tion deziras.

Eksterlandaj abonoj: Minimume, 60 pesetojn jare.

Kolektivaj membroj: 6 pesetojn jare.

La grupo ricevas po unu ekzemplero por ĉiu deko
de tiuj membroj.

Korespondaj anoncetoj: 10 pesetojn aŭ du
respondkuponojn ĉiu 20 vortoj aŭ frakcio.

Pri aliaj anoncoj, bonvolu peti informojn.

Antaŭ ol sendi leteron rimarku ke:

Oficialaj aferoj devas esti adresataj al:

Federación Española de Esperanto

Str. Marqués de Caro, 6, Valencia (Hispanujo)

Originalojn, solvojn de enigmoj, sugestojn por **Bo-
letín**, k. t. p., adresu al:

S-ro Angel Pérez Saura (por **Boletín**)

Str. V. Sancho-Tello, 24, b. d., Valencia (Hispan.)

Monsendojn adresu nepre al:

S-ro Ernesto Guillem Tarín

Str. Marqués de Caro, 6, Valencia (Hispanujo)

(Klarigante la destinton de la sendita mono: por
HEF, por **Libroservo**, por **Boletín**, por io alia.)

Kaj sendaĵojn pri statistiko kaj informado sendu al:

S-ro Salvador Arago (HEF-informoficejo)

Str. Arce, 8, 2^o, 4.^a, Cornellá (Barcelona) (Hisp.)

Tiamaniere vi helpas al la POŝTOFICEJOJ, al
ni, kaj al vi mem.

NUESTROS SOCIOS
PROTECTORES EN 1962

(En esta lista no incluiremos a los que reci-
ban dos ejemplares del Boletín.)

D. José Ezquerro, Barcelona

D. José Hutesá, Sabadell

D. José Perogordo, Madrid (†)

D. Justo Estañ, Granada

D. Mariano Solá, Tarrasa

D. Antonio Gamboa, Valladolid

Lista de Abril y Mayo

Kongresa Organiza Komitato
de la
XXIII^a Hispana Kongreso
de Esperanto, en Valladolid



S-ro Basílides Sanz, prezidanto

» José Sastre, Viceprezidanto

» Mariano Cantalapiedra, sekretario

» Rafael Sánchez, Asisto-kontisto

» Zoilo Caminero, voĉdonanto

» J. M.^a Alonso Buenapósada, voĉdon.

E-no Clementina Tranque, voĉdonantino

» Carmen Conde, voĉdonantino

» Natividad Lovingos, voĉdonantino

S-ro Gonzalo Castañón, voĉdonanto

» Antonio Castañón »

» Antonio Díez Gómez »

» Francisco Morayo »

» Antonio Gamboa »

» Fabriciano Bermejo »

» Nestor Centeno »

» Jacinto Urueña »

» Nilo del Olmo »

» José de la Palma »

*Ĉi tiuj gesinjoroj konsistigas la plenan
Komitaton. La Konstanta Komisiono (Plen-
komitato) konsistos el ĉiuj, kiuj povas ĉeesti
almenaŭ po unu tago semajne la kunsidojn.*

*El ĉiuj voĉdonantoj (ankaŭ voĉdonantinoj,
se necese) devas esti elektitaj la Prezidantoj
de la diversaj Komisionoj: Loĝado, Propa-
gando, de kongresanoj, Organizado pri Kul-
turaj aktoj, Ekskursoj, Helpo al la Sekretario,
k. t. p.*

URĜA KAJ GRAVA ALVOKO

La Organiza Komitato de la Kongreso en Valladolid troviĝas en malfacila kaj malagraba situacio. Ĝi penis kaj strebis dum unu jaro por organizi brilan kongreson, kaj la tuta Aŭtoritatularo esperas ke centoj de kongresanoj—ĉu landaj, ĉu eksterlandaj—plenigos la urbon kaj ĉeestos la oficialajn kunvenojn, por kiuj ili disponigis la plej belajn salonojn kaj promesis sian ĉeeston. Plie, ili helpas kaj financos plurajn programerojn.

Laŭŝajne, la hispana esperantistaro ne respondis, ĝio nun, al tiuj penoj kaj streboj de la Organiza Komitato, kaj tio minacas endanĝerigi ĝin antaŭ la juĝo kaj konsidero de la Aŭtoritatoj. Esperanto riskas esti konsiderata kiel bagatelajon aŭ kiel manion por... manpleno de stranguloj!

La afero estas grava. Ni ne povas lasi O.K-n en malagraba situo antaŭ la valladolidaj gravuloj, kaj ni ne devas permesi ke Esperanto, nia kara afero, restu en ridinda konsidero de aliuloj!

Do, samideanoj, mi laŭtas por peti ke vi ĉiuj faru vian plejblon por ĉeesti la kongreson. Ĉefe, tiuj, kiuj, pro la proksimeco, havas oportunojn por veturi tien, devas tuj aliĝi:

Madrido, Santander, Asturio, Baskonio, Galegio kaj, eĉ, Zaragozo, estas pli devigataj, ĉar, por ili, la ofero—de tempo kaj mono—estos malpli peniga.

La Federacio, pere de Bulteno, tre klare prezentis al ĉiuj la allogaĵojn de la urbo kaj de la regiono, kaj, ne malpli, la intereson de la kongreso kaj la esperon de la urbaj gravuloj. Estus hontige por ni ke la kongreso estu maldensa kaj malbrila. Neniu samideano devas esperi ke aliaj iru kaj solvu la aferon. Ne! Vi, vi ĉiuj devas pensi ke vi mem povas endanĝerigi nian kongreson, per via malĉeesto!

Mi esperas ke vi ĉiuj rapidos kaj aliĝos tuj! Ne lasu ke, pro via kulpo, nia afero falu en ridindan truon!

Via ĉeesto devas esti la plej forta garantio de via seriozeco kaj de esperantemo. Ĉu vi helpas la kongreson kaj tiel helpas... vin?

Via, altestime:

LA PREZIDANTO de H. E. F.

ESPERANTO EN LA — HOTELOJN!

Post la lernejoj, kien? La estonta generacio, ekipita per Esperanto dank' al la longe sopirata enkonduko de la lingvo en la lernejprogramoj, deziros tuj trovi terenon por eluzi sian scipovon. Fremdaj lingvoj uziĝas inter fremduloj; por renkonti plej facile fremdulojn, oni devas vojaĝi; dum vojaĝado, oni tranoktas. Jen do nia tereno—la hotelejoj.

Unu el la lokoj, kie tuj sentiĝas la ĝeno de lingva nescio, kie do tuj sentiĝas sin la avantaĝo de komuna lingvo, estas la hotelo. Tien oni kutime iras tuj post alveno en la landon, ofte laca post la vojaĝo kaj iufoje trafanta en ian malfacilaĵon rilate ĉambron aŭ pasporton. Tie la vojaĝanto sentas senŝarĝiĝon, kiam la deĵoranto montras sin kapabla eĉ nur balbuti ion en lia lingvo. Sed deĵorantoj ne povas esti poliglotoj; kaj estas humilige por ambaŭ kiam ili devas utiligi la lingvon de tria nacio. Estus granda akiraĵo por la turismo, tiel por la gasto kiel por la gastiganto, se Esperanto fariĝus la normala lingvo de la vojaĝanto.

Ne temas nur pri tio, ke en ĉiu hotelo estu unu deĵoranto scipovanta Esperanton. Tio ja estus multo; sed se la hotelestroj agnoskus ĝis tia grado Esperanton, la logiko mem postulus, ke ili etendu la uzadon de la lingvo tra la tutan hotelan organizaĵon, t. e. ke ili uzu ĝin en avizoj, menuoj, kaj ĉiuspecaj indikiloj.

Ĉi tiu revo estas, en almenaŭ unu kazo, realaĵo. En Aŭgusto pasintjare, volante konsoli min pro neĉeesto en la U. K. en Harrogate, kaj memorante paĝon 313 de Jarlibro, mi vizitis la pitoreskan urbeton Cervia (pron. Ĉervoja) sur la adriatika marbordo, kie mi somerumis. Mi ankoraŭ ne estis atinginta mian celon, la «Pensio Restoracio Esperanto» (Viale dei Mille, 70), kiam voĉo salutis min en la internacia lingvo. (La insigno!). Mi turniĝis, kaj jen kvar Esperantistoj—francaj kaj germanaj geedzoj—gastoj ĝuste en tiu pensio. Ni reiris kune; kaj tie mi konstatis, ke la nomo «Esperanto» estas meritita: la lingvo estas ĉie antaŭ la okuloj—sur la menuoj, sur la pordoj (banĉambro, tualetejo ktp.), sur la avizotabulo. S-ro Giuseppe Melandri, posedanto kaj estro, kredas je Esperanto, kaj tradukas tiun fidon en la praktikon. Mi aldonu, ke la uzo de Esperanto estas nur unu el la allogaĵoj de ĉi tiu bela, nova hotelo, ĉar oni ankaŭ manĝas bone tie kaj dormas trankvile.

Kion povas fari la unuopulo, por ke tia situacio estu normalaĵo? Necesas ja planita kampanjo, kiel ĉe la lernejoj; dume, oni povas konsciigi hotelestrojn pri Esperanto kaj ĝia utileco ĉiam demandante ĉe alveno, «Ĉu vi parolas Esperanton?» Estas tempo, ke nescio de Esperanto estu hontiga;

Redaktoro.

El «British Esperantist».—Aprilo, 1962

MOYÁ, KURSO-FINA FESTO

La 19-an de majo, vespere, okazis ĉe nia Grupo, simpatia festo por solene fermi la du Esperantajn Kursojn kiuj sukcese funkciis dum la pasinta vintro.

La ĉefa parto de la festo estis prezentado de interesa kolekto de koloraj diapozitivoj pri la Kastelo GRESILLON—kulturdomo de la francaj esperantistoj—, per

kiuj la ĉeestintoj konis la ĉirkaŭaĵojn de la fama kastelo kaj ankaŭ la internan funkciadon de la esperantaj arangaĵoj.

Ĉeestis preskaŭ 50 gemembroj.

Pasintan dimanĉon, la 27-an de majo, multenombra reprezentantaro de nia Grupo partoprenis en Sabadell la unuan HEJS renkontiĝon. Nome de niaj gejunuloj salutis la ĉeestantaron, samideano Albert Parareda.

Ante el XXIII Congreso Español de Esperanto

A TODOS LOS ESPERANTISTAS

Se va acercando la fecha de celebración de nuestro XXIII Congreso Español de Esperanto. Valladolid, que ha tenido el honor de ser elegida para sede de este Congreso, se dispone a recibir a los esperantistas, tanto españoles como extranjeros y ofrecerles un clima de auténtica hermandad, en una cadena de actos culturales y recreativos que han de proporcionar a cuantos la visiten unos días de inefables goces para el espíritu y una magnífica oportunidad para la práctica de la lengua internacional.

Todos los años, nuestros Congresos se celebran en ciudades de distintas regiones, en medio de los más variados paisajes; cada ciudad muestra a los visitantes sus bellezas peculiares: playas, montes, progreso urbanístico, monumentos, tipismo regional. Unas veces los ecos de nuestras reuniones se extienden por la inmensidad del mar, otras ascienden a las cumbres de los montes, otras ha de cabalgar sobre palmeras y naranjos. Este año, los dulces acentos del Esperanto resonarán entre vastos campos de pinares y viñedos, y sobre llanuras de inmensos trigales, que por el mes de Julio se ofrecerán a nuestros ojos, no verdes, como signo de la esperanza de una buena cosecha, sino ya en vísperas de entregar su fruto a los hombres; campos amarillos, salpicados de las manchas rojas de las amapolas, formando todo ello un bello conjunto, símbolo de lo español, por los que resonarán las notas alegres de las canciones y las danzas del folklore vallisoletano.

Valladolid, pues, os ofrece todo cuanto atesora: su hidalguía, sus monumentos, pregoneros de hechos trascendentales de la Historia de España y ejemplares valiosos del arte arquitectónico, y su Museo Nacional de Escultura, mundialmente famosos, en donde podréis contemplar la madera de sus pinos convertida en vida y expresión por el genio creador de sus escultores de siglos pasados, que atrae a millares de turistas extranjeros todos los años sólo por contemplarlo. Pero Valladolid no es sólo una ciudad plena de recuerdos históricos, sino que ofrece contrastes fuertes cuando al lado de las emociones estéticas que proporcionan sus monumentos puede gozarse de amplias y modernas calles, bellos y bien cuidados jardines y paseos y suntuosos edificios modernos.

Aprestaos, pues, a venir a Valladolid a tomar parte en este XXIII Congreso Nacional, a disfrutar de unos días felices, a la vez que laborar en pro de la lengua internacional y mejorar y ampliar nuestra organización, para hacerla más eficiente y vasta. Pero no dejéis para los últimos días vuestra adhesión, porque ello puede entorpecer la buena organización de los actos.

En este Congreso deberán adoptarse importantes acuerdos para el porvenir del Esperanto. Acudid en masa!

Valladolid os espera a todos!

X.

ANONCETOJ

Dezirás korespondi per p.k. kun ĉiuj landoj: Emilia Folgado López. Str. Cardenal Cisneros, 48. Badajoz (Hispanujo).

David W. M. Jenkins, Apartament 62, 76 Eglinton Avenue, East, Toronto, 12 (Canada), diplomita kontisto, deziras korespondi pri linvoj, religioj, mondaferoj k.t.p.

Colecciono todo referente al Esperanto. Compro o cambio: sellos, matasellos, viñetas, postales congresos, etc. Evaristo Gil. Apartado 875. Barcelona.

Aŭdebla en Gandia (Valencia) kaj ĉirkaŭaĵoj. Radiostacio: «Ausias March» el la Laborinstituto de Gandia. Ĉiulunde je la 21^a, 30'. Longondo: 250 m. Povo 500 W.

ATAITISMO, U. E. A. KAJ NI

De longaj jaroj—de la tempoj de Zamenhof, mem—la problemoj pri la uzo de partikoloj polemikigis, ne la uzantojn de la lingvo, sed la lingvistojn, literaturistojn kaj, ĉefe...la polemikistojn!

La afero trenis, trenadis, kaj ne okazis sangoversado. Multe pli akriĝis la aferoj ujo-io, la senĉapeligo de literoj, kaj multaj aliaj diferencoj en la uzo de la lingvo. La Akademio, per konstanta kaj admirinda silento tute ne solvis tiujn aferojn; ankaŭ ne tiun ĉi! Sendube, niaj «nemortebloj» pensas ke meniu el tiuj aferoj povas endanĝerigi la forton nek la unuecon de nia lingvo, kaj ili opinias ke atistoj kaj itistoj povas riĉigi nian literaturon per siaj malsamnuancaj elskribaĵoj. Multaj konsciaj esperantistoj opinias tute same. Sed ne aliaj, kiuj disŝiris siajn vestaĵojn kaj laŭtkriis: «Perfidon! Skimson!», k. t. p., k. t. p...

Kaj, jen; ĉar la Akademio, laŭŝajne, tute ne akordiĝas pri ia decido, U. E. A. decidis akademiĝi kaj, sur la lasta numero de «Esperanto» ĝi atentigas ke ĝi nur uzos la

Zamenhofan Esperanton, tiel kiel D-ro Zamenhof difinis ĝin en la Gramatiko kaj Ekzercaro de la Fundamento. Aliaj naciaj organizoj iras pluen kaj kelkaj elstaruloj sin ekskomunikas reciproke...

Batalo denigrulojen profundo de tunelo:

Ni kuraĝas opinii ke, kvankam la lingvo estas la bazo de nia komunumo, la unueco estas la premiso de nia ekzistaro, kaj ke, anstataŭ traseri motivojn por estarigi landlimojn ni devas peni por stompi ilin, ĉefe en aferoj kiu, en la estonto, ridetigos ĉiujn! La afero ata-ita estas cerbumo por..., kronometristoj! Do, nia Federacio, ĝis okazo de Ĝenerala Kunsido, rapidas eldoni sian decidon pri la gullivera afero:

1^o Obeo al la Zamenhofaj lingvouzo kaj normoj.

2^o Rekomendo al siaj membroj por ĉesigo de ĉia polemiko.

3^o Ĝis kiam la Akademio solvos la aferojn—eble «ad kalendas graecas»—ne plu starigi tiajn problemojn inter ni. Veraj problemoj prezentigas, ja, memvole!

Proprariske: La Prezidanto de H. E. F.

NI FUNEBRAS!

Antaŭ multaj jaroj—en la Zamenhofaj—simpatia hispana samideano ĉeestis, kutime, la internaciajn kongresojn. Eĉ, en la Antwerpena (1911) li surmetis al D-ro Zamenhof la Grandan Kolrington de «Isabel la Katólica», plej alta Akademia rekompenco, laŭ persona deziro de la tiam hispana reĝo Alfonso la XIII^a, kiu tre favore konsideris Esperanton.

Tiu meritoplena samideano, tiam inĝeniera kapitano, José PEROGORDO, daŭre laboris por nia afero kaj, post multaj jaroj, li farigis general pri Aviadilarmejo, el kies specialaĵo li estis heroo pioniro.

Ĝis la lastaj jaroj li helpis nian organizon, kaj, spite de multaj malfacilaĵoj, li sukcesis helpi kaj, eĉ, ebligi, per sia persona prestiĝo kaj influo, la restarigon de nia movado, post nia civilmilito, kaj la realigadon de la unua postmilita kongreso—Tarrasa, 1961.

Li ĵus estingiĝis en Madrido, pli ol 90-jara, korpe elĉerpita, sed, mense vigla. Antaŭ mallonge li senkulpigis sin antaŭ mia persona konsidero, pro fizika maleblo por helpi pli aktive nian aferon!

Nun, li jam forflugis alten, en helajn kaj sumbrilajn regionojn, kien li de longe sopiris kaj kien iros ankaŭ, en daŭra akompano, niajn karajn rememorojn! Ke lia animo ripozu pace!

R. H.

STAFETO 10 jara

La 31. V. 62 la Radio de Prago dissendis la jenan triminutan paroladeton de D-ro Tomás Pumpr. Kiel omaĝon al nia eldonejo kaj al la laboro de nia membro J. Régulo Pérez, ni havas la plezuron ĝin konigi al niaj legantoj.

Kara amiko aŭskultanto:

Ĉu vi havis en la manoj iun el la lastatempaj libroj aperintaj en la eldonejo ESTAFETO?

Antaŭ ne plenaj dek jaroj tiu plej aktiva eldonejo en Esperantujo komencis sian aktivecon tre modeste, sed, esperinde, per originala poemaro de kvar skotaj poetoj sub la titolo *Kvaropo*. La fondinto kaj eldonisto de ESTAFETO, Juan Régulo Pérez, nun profesoro de universitato en La Laguna, sur Kanariaj Insuloj, transprenis la torĉon de la jam historie fama Literatura Mondo en Budapeŝto. La entrepreno ŝajnis riska kaj ĝiaj ŝancoj dubeblaj. Tamen STAFETO persistis kaj sukcese superis nemalgrandajn malfacilaĵojn.

Se ni nun rigardas refaldon de la plej freŝa eldonaĵo de ESTAFETO, ni legas liston de jam tridek aperintaj titoloj kun pli ol ses mil kvincent paĝoj da teksto. Kaj aliaĵses libroj ĝuste nun troviĝas sub preso.

Pri kio temas tiu abunda rikolto de literaturo?

Ĝi disfalas en kvar seriojn.

La serio *belliteratura* estas la plej ampleksa. Ĝi enhavas originalajn kaj tradukitajn poemojn, novelojn, dramojn, romanojn.

La dua serio *popularscienca*, entenas, ĝisnun, tri librojn: pri botaniko, geografio, speleologio.

En la tria serio, *Movado*, aperis du verkoj lingvosciencaj.

La kvara eldonserio, *Beletraj-Kajeroj*, ampleksas plejparte originalajn verkojn de esperantaj poetoj, inter ili kelkaj debutantoj, al kiuj la eldonisto donis la ŝancon pruvi sian talenton antaŭ la internacia publiko,

Kaj la pluaj eldonplanoj: Ili estas riĉaj. Ni legas pri pretigo de pliaj dek volumoj diverseternaj.

La eldonagado de ESTAFETO estas impona. La kvalito de la aperintaj verkoj estas eminenta. La lingvo estas ali-nivela.

Kia estas la tasko de la esperanta publiko? Kara aŭskultanto, respondu mem.

D-ro. Tomás PUMPR

MALFERMITA LETERO

S-ro Redaktoro de *Boletín*.

Estimata Samideano:

Mi ĝoje profitas la okazon kiun nia Bulteno donas al ĉiuj gehefanoj por proponi ion, kie eble estas realigebla, realiginda aŭ realigenda.

La franca geesperantistaro jen havas sian faman Kastelon de Gresillon kien la geesperantistoj, ne nur francaj sed ankaŭ ĉiulandaj, povas vojaĝi por ĝui agrablajn libertempojn.

Ni, hispanaj geesperantistoj, ne ankoraŭ havas tian kastelon aŭ somerrestadejon, kaj, eble, neniam ĝin povos havi, pro la eteco de niaj ekonomiaj rimedoj kaj ankaŭ, ĉefe, pro nia ĉiama malforteco.

Tamen, mi proponas hodiaŭ ion kion mi opinias estas eble efektivigebla, kaj efektiviginda pro la aelativa malgrandeco de la financaj rimedoj uzotaj kaj mi submetas mian proponon antaŭ la okuloj de la hispanaj esperantistaj ĝejnuloj.

Ĉu oni ne povus aĉeti, aŭ, lui, en malkaraj kondiĉoj, terpecon por ekstarigi modestan konstruaĵon (rememoru pri la montodomo «ESPERANTO», en Bulgarujo) aŭ eĉ nur konstantan internacian tendumejon?

Ŝajnas al mi ke la plej taŭga regiono en nia lando estus Katalunujo aŭ, eble, ankaŭ, la valencia regiono, ne nur pro tio ke en tiuj regionoj ekzistas la plej granda nombro de geesperantistoj, ĉefe junaj geesperantistoj, sed ankaŭ pro tio ke en tiuj regionoj, preskaŭ ĉiam varma aŭ varmeta... kaj la lazura Mediteranea Maro, ĉiam estas pri milda, kvietaj kaj sendanĝera ol tiu de la nordaj, atlantikaj aŭ sudatlantikaj regionoj.

Kion pensas pri tiu ĉi propono la junaj catalunaj, valenciaj... aŭ balearaj gesamideanoj? Nun alvenis ilia parolvico pri la proponita libertempejo.

L. de O. - Bilbao

NOVAJ LIBROJ SUB LA EFIKO DE Kritiko

LA BELAN PACON, de Senzi Yamaguti. Trad. Ter. Isiguro. Dua eldono. Gaŭda Rondo, Sugamo 7-1662, Tosimaku, Tokio, 1959.

Tiu ĉi 31-paĝa verketo temas pri la eksplodoj de atombomboj sur Hirosima kaj Nagasaki, en Aŭgusto de 1945. Eksplodoj kiuj mortigis tuj 333.000 homojn kaj vundis 235.000. El tiuj vunditoj, 88,7 % mortis antaŭ la 10^a tago post la malhumana monstra eksperimento kaj, krome, de tiuj, kiuj estis kelkajn kilometrojn for de la eksplodcentro, la radioaktiveco forprenadis la vivon unuj post la aliaj, eĉ multajn jarojn poste de la du fatalaj tagoj.

S-ro Senzi Yamaguti kortuŝe verkis siajn traviaĵojn, kaj sciante ke li estis komdamnita al nepra morto, li forgesis tion por sin dediĉi al konsolo de siaj malfeliĉaj samsortanoj kaj ankaŭ labori por veki la publikan opinion de la homaro kontraŭ la produktado, eksperimentoj kaj konservo de ĉiaj nukleaj armiloj.

Samideano Mioko Adati, en la antaŭparolo al la bela esperanta traduko de Ter. Isiguro, petas estu tradukata «La belan pacon» en ĉiun nacian lingvon, por ke ĝi estu legata de ĉiuj homoj en ĉiuj landoj, kio estos unu paŝo al la fina celo de ĉiu konsecia esperantisto: la paco.

J. DEVIS

KARPETOJ TRANSSALTIS LA DRAKPORDON.

Libreto 32 p. 21 x 18 cm. kun multkoloraj belegaj bildoj en ĉiu paĝo, eldonita de Ĉina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 77, PEKINO, Ĉinio.

Infanlibreto alvenis tute nepripensite, kaj multe ĝojigis min. Mi rajtas esti infano kaj amuziĝi per la ĉarmaj bildoj, kaj per la mildega feliĉa rakonto pri kvin karpetoj kiuj multe naĝis, senbrue, foje kontraŭ la fluo, unue en trankvila rivereto, poste en rapida torento, finfine en granda rivero, serĉis, demandis, evitis la barojn de la vojo,

restis timigitaj de lokomotivo kaj trajno, ĝis finfine ili trovis la grandegan drakpordon, kaj preskaŭ nekredible ili transsaltis ĝin kaj trovis... Oh, paradiza artfarita lago, tio estas preskaŭ la ĉielo! La hirundo helpis ilin kaj transdonis salutojn al la avino.

Neniu malamo, neniu vengo, neniu malbonulo; estas bonaj kvalitoj por infana rakonto, senkompare multe pli bona ol tiuj de la t. n. filmoj por infanoj. Aĉetu ĝin, kaj certe vi ne eraros!

E. G.

Restas vund'...

De I. Schoon

Haarlem (Nederlando)

Vivis mi dum kelka tempo

En revita paradiz'...

Dum vespero en printempo

Ĝis kor' pro amsurpriz'...

Naĝis en feliĉ'—laguno

Naivula bonanim'

Menson resanigis luno:

Simfonia pantomim'!

Efemeris la kunesto

Per diabla temporab'...

Venis fino al la festo:

Por feliĉo... mortofrap'!

Sonis adiaŭaj la vortoj;

(Ne silabo pri revid'!)

Ruiniĝis pro perfortoĵ;

For feliĉ'! Revpiramid'!

Superjar-privilegio (1)

Vokis ja al rendevu...

Mutis mi ĉe l'entombigo

De l'naskota amogu'...

Sed, enkorre pli ol riĉa:

Ja pli bone «morta am'»,

Ol neniam kor'dediĉa!!

Restas vund'... sed... kun balzam'!

(1) En Nederlando dum superjaro la knabinoj «rajtas» peti knabojn...

C A M P I N G

UNUA OFICIALA INTERNACIA TENDUMEJO APUD BILBAO

Tendumi estas, sendube, agrabla afero. En Hispanujo, tamen, la tendumado ne estas, ĝis nun, ordinara kutimo sed, iom post iom, ni eniras, malgraŭ certaj malhelpoj, en la eŭropajn kutimojn kaj sportojn.

Ekde la 15^a de proksima junio ekfunkcios, apud la strando «LA ARENA» en la vilaĝo SOMORROSTRO, je 17 km. de la provinca ĉefurbo BILBAO, internacia tendumejo. Ĉiu oficiala inaŭguro, tamen, okazos nur dum printempo 1963^a, kiam ĝi estos jam plibonigata kaj pliampleksigata. Tiu-ĉi kampaĵo estas lokigata je 150 m. de la Kantabra marbordo kaj tuj apud la ŝoseo.

Nun, ĝi havas amplekson nur por 35 tendoj, sed, nuntempe oni aranĝas la terenon por pliampleksigi la areon, tiamaniere ke ĝi povu enhavi ĝis 150 tendojn. Ĉiu tendo disponas je spaco de 100 m² kun propra areo por parki veturilojn. Nune la areo ampleksas nur 3.500 m² sed oni povas pliampleksigi ĝin ĝis 15.000 m² kun speciala zono por parki aŭtomobilojn.

La prezoj por restado en ĉi-tiu unua vizkaja tendumejo, por eksterlandanoj, estas jenaj: 10,—pesetojn por persono tage, kaj ankoraŭ 12,—pesetoj por ĉiu aŭtomobilo aŭ veturilo, ĉiutage.

La Tendumejo funkcios, kiel dirite, ekde la 15^a de junio nunjara ĝis la 15^a de septembro, en kies dato la tendumejo estos fermata. Oni povos havi, inter aliaj akcesoraj instalaĵoj: administradan oficejon, nutraj-vendejon, trinkejon kaj higienajn servojn.

Interese por ĉiuj tendumemaj geesperantistoj estas scii ke, krom la malmultekosteco de la prezoj, ili povas facile interrilati kun hispanaj gesamideanoj, ĉar je 18 km., t. e., en BILBAO, ekzistas vigla Esperanto-Klubo kun c. 190 gemembroj. La Grupejo situas en malnova kvartalo de Bilbao, str. Barrencalle Barrera n.º. 7-2.º-dekstre, telefono 24 44 92, kie la gesamideanoj kunvenas ĉiutage, escepte dimanĉojn aŭ festotagoja, ekde la 19^a h. ĝis la 22^a h. vespere.

La adreso por interrilati kun la ĉefoj de l'priskribita tendumejo estas: «Club Internacional de Camping», str. La Paz núm. 5, BILBAO, sed gesamideanoj povas ankaŭ peti informojn de la Bilbao 'a Esperanto-Grupo, aŭ rekte de la subskribinto.

L. de OTAOLA.—Bilbao

str. Iturrubide, 72-2.º-d.

(Represo ne nur permesata, sed varme deziregata k. rekomendata).

NIA FOTO SUR LA KOVERTO

La 27-an de majo okazis en Sabadell la 1-a Hispana Junulara Esperanto Renkontiĝo, kiu plene sukcesis, pro la partoprenintoj, pli, malpli, 80 esperantistoj, el ili 55 gejunuloj, kaj ankaŭ pro la rezultoj, ĉar la ĉeestantaro aprobis la unuan Bazan Laborplanon de HEJS por la venontaj 4 jaroj, prezentita de la HEJS-estraro.

La foto sur la koverto montras la HEJS estraron. De maldekstre: S-roj R. Alberich, S. Llorén, Sekretario F. Parareda, Vicprezidanto A. Tomasa kaj Prezidanto S. Aragay.

MADRIDA ESPERANTO-LICEO

Niaj samideanoj el Madrid komunikas al ni ke, de nun, sia societo ricevas la nomon: Madrida Esperanto-Liceo. Estas opinio de la madrida samideanaro, tre vigle gvidata de D-ro Arranz, ke la vorto «klubo» tro multe estas ligata al sport-societoj, danĉejoj, kabaredoj, trinkejoj, k.t.p., kio ne favoras ilin; krome, la vorto «liceo» pli respegulas la agadon kaj celon de la madrida esperantistaro.

Adreso: MADRIDA ESPERANTO-LICEO. Str. Alberto Aguilera, 32, MADRID,

Ĉiu membro de nia Federacio aŭ abonanto de nia bulteno, sendinta korektan solvon de enigmo, gajnos poenton. Gajnintoj de 5 poentoj ricevas libropremion. Ni akceptos solvojn ĝis la 20-Aŭgusto.

SOLVO DE LA ENIGMO NUM. 10

HORIZONTALE

1, Banala. Vindas.—2, Virga.—3, Nive-
li. Ripeti.—5, Komisie.—6, Skola. Gasto.—
7, Kuglego.—8, Ebona. Izoli.—9, Trejnas.
10, Mortu. Tedos.—11, Ateismo.—13, Eten-
di. Vintra.—14, Plata.—15, Afonio. Striko.

VERTIKALE

1, Bendas. Modera.—2, Kablo.—3, No-
vulo. Rabeno.—5, Kakatua.—6, Avino.
Tripo.—7, Magnete.—8, Aroki. Indaj.—9,
Sternas.—10, Varbi. Movas.—11, Egoisto.
—13, Dresas. Distri.—14, Talio.—15, Sciur-
ro. Straso.

SENDIS KOREKTAJN SOLVOJN:

A. Tomasa, R. Albero, R. Bastardas,
M. Sosvilla, A. Kirch kaj P. Naranjo.

ENIGMO NUM. 11

de J. Devís

La solvo konsistas el 36 literoj, kiuj
estas numeritaj. Ĉiu nombro signifas unu
literon. Oni povas trovi la literojn pere de
la ses sekvantaj ŝlosilvortoj.

29, 12, 35, 20, 8, 3, 17, = Malgranda taĉ-
mento soldatoj.

16, 31, 30, 11, 21, 20, 46, = Granda pu-
blika konkurso.

2, 3, 4, 5, 6, 15, 13, 25, = Gustoplene
distinginda.

24, 10, 18, 35, 23, 27, 28, = Bonmaniere
afabla.

1, 14, 32, 21, 22, 23, 26, = Tute fordo-
nis al...

7, 19, 34, 9, 33, = Kun ties eroj tre
proksimaj unuj al aliaj

1, 36, = Zamenhofa proverbo.

PARTOPRENU NIAN NACIAN KONGRESON en VALLADOLID!

Alvokoj, cirkuleroj, k. t. p., el la esperantista mondo

*Centra Dana Esperantista Ligo ĵus eldo-
nis glumarkon por butikoj, kun jena teksto:
ESPERANTO ESTAS PAROLATA». La
intenco estas ke tiu glumarko troviĝu ĉie kie
laboras esperantisto. Baldaŭ vi povos mendi
tiujn glumarkojn ĉe nia Libroservo.*

*Prelegos: Prof. D-ro Ivo Lapenna (Britu-
jo), Prof. D-ro Hideo Yagi (Japanujo), D-ro
S. Pragano (Nederlando), kaj S-ro Jean Thie-
rry (Francujo)*

*Informojn kaj aliĝilojn oni petu ĉe S-ro
Jan Strönné, Amiralsgatan, 36, Malmö, Sve-
dujo.*

*Sveda Esperanto-Instituto aranĝos ĉijare,
12-19 aŭg., prelegsemajnon en Frostavallen
(Svedujo). La temaro estos:*

UNESKO-Semajno

*La laboro de Unesko. La Granda Projekto
Oriento-Okcidento. Ĉefverkoj de la Monda
Literaturo en la Internacia Lingvo.*

*Grava nova dokumento. Eldono de libro:
«Esperanto en komerco». 105 paĝoj enhavan-
taj raportojn pri 80 internaciaj firmaoj kiuj
uzas Esperanton en siaj komercaj rilatoj. El-
dono kvinlingva de Esperanto-Rondo Crails-
heim». Germanio. Prezo: gm 1'50.*

KVITANCO

—«Comarca», de Mieres.—13-1-1962.—
Informe pri E-kurso.—Cándido Cienfuegos
Barberá.

—Faldfolio. Decembro 1961. — Propa-
gando de Ekspozicio pri E. en Zaragoza.—
Inés Gastón. (Ŝi sendis ankaŭ tri fotojn pri
la ekspozicio.

—«Destino».—30-12-61. — Artificiali-
dad. (laŭ informo de la verkisto S-ro Delfi
Dalmau).

—«El Guerrillero». el Til Til. (Chilio)
Junio 1961.—Esperanto Kurso.

—Bulteno de «Formiga Martinense», kun
artikolo pri Esperanto kaj la literaturo (ja-
nuaro). Sendis S-ro F. Vilá.

—Ĵurnalo «Balears» Gravega artikolo
kaj samtempe intervjuo al D. Miguel Ar-
bona. (23-2-62). Sendis S-ro M. Arbona.

—Ĵurnalo «Barcelona» Noto pri la arti-
kolo verkita de S-ro J. Aragay pri la «Cien-
cia y el Esperanto» Sendis S-ro J. Climent.
(7-3-62).

—Ĵurnalo «El Faro» Tre interesa arti-
kolo pri la propono organizi la Hispanan
Kongreson en Ceuta. (15-3-62). Antonio
Rico.

—Ĵurnalo «Menorca» informo pri la
kurso en «Ateneo» (Mahon) (26-3-62). Sen-
dis. S-ro Andres Murillo.

—Ĵurnalo «Correo Catalán» Interesa
artikolo respondante al alia pri la neceso
de internacia lingvo en la mondo. (29-3-62)
Sendis. S-ro J. Climent.

—Ĵurnalo «Barcelona» Noteto pri la
propono akcepti la anglan lingvon kiel
internacian. Sendis S-ro J. Climent.

—La revuo «Noticias de Actualidad»
Aperis letero al la Direktoro de sami-
deano Giordano Moya pri la akcepto de
Esperanto en Usono. (1-4-62). Sendis. S-ro
R. Canet.

—La bulteno «Tosca» de Moya enhavas
kelkajn informojn pri la Hispana Kongreso
kaj la Esperanta movado en la mondo.
(1-4-62) Sendis S-ro R. Molera.

—Ĵurnalo «El Correo Catalán» Alia ar-
tikolo pri Esperanto (19-4-62). Verkis kaj

sendis al la Informoficejo S-ro José de la
Cruz.

—Ĵurnalo «Mallorca» Noteto pri la el-
donado de la nova revuo «Nova Civito»
(18-4-62) Sendis S-ro M. Arbona.

—Ĵurnalo «La Voz de Asturias», Tre
grava artikolo pri Esperanto kaj Zamen-
hof (14-4-62) Sendis S-ro Sacramento Co-
llado.

—Ĵurnalo «El Correo Catalán» Artikolo
kontraŭ Esperanto (18-3-62), Sendis S-ro
J. Climent.

—En la teatra revuo «Scena» aperis in-
teresa artikolo kaj eta informo pri Espe-
ranto kaj Teatro, januaro-februaro 1962).
Sendis S-ro S. Guell.

—La gravega revuo «Gaceta Ilustrada»
En artikolo verkita de S-ro J. María Pemán
traktas la problemon de kulturaj rilatoj;
la verkisto, nur menciis la Latinan lingvon
kaj Esperanton, marto-1962.

PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos recibidos durante Abril y Mayo 1962)

	Pesetas
<i>Suma anterior</i>	2.490
J. Ventura, Tarrasa	40
J. Iranzo, Bilbao	40
J. Frugoni, Telde	40
J. Castells, Suecia	15
J. Blasco, Sabadell	15
J. Estañ, Granada	80
M. Álamo, Valverde	15
M. Pinilla, Zaragoza	15
F. Marqueta, Zaragoza	20
F. Sübert, Zaragoza	15
M. Solá, Tarrasa	380
J. V. V., Sabadell	40
S. Mayoral, Barcelona	28
J. Marcé, Vendrell	40
L. A. Ramírez, Huete	13
A. Marco, Zaragoza	20
M. Garriga, Tarrasa	25
E. Pérez, Valencia	40
<i>Suma Pesetas</i>	3.371



1.^a Hispana Junulara Esperanto-Renkontiĝo



POŜTKARTOJ

por propagando de nia

23.^a Kongreso

Po 1'50 ptojn. unu.



Glumarkoj dukoloraj

Po 1'50 ptojn. unu folio.

AĈETU ILIN BALDAŬ!